

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

Accademia
Internazionale
delle Scienze

International
Academy
of Sciences



San-Marino

Internationale
Akademie der
Wissenschaften

Académie
Internationale
des Sciences

29-a SANMARINECA UNIVERSITATA STUDADSESIO

SUS 29

Komárno (SK)
2006-08-27 / 09-03
(1705/1706 pŕ)

Neunundzwanzigste Sanmarinesische Universitäre Studentagung

Ventinesima Sessione Universitaria Sammarinese

Twenty-ninth Sanmarinian University Session

Vingt-neuvième Séance Universitaire Sanmarinienne

Dvadsiate deviaty univerzitrné zasadnutie AIS San Marino

Huszonkilencedik san-marino-i egyetemi értekezlet

*Laborlingvoj · lingue di lavoro · Arbeitssprachen · working languages · langues de travail
la Internacia Lingvo (ILO) · italiano · Deutsch · English · français
slovenčina · magyarul*

Programo de SUS 29

La studadsesio SUS 29 de AIS okazos en la urbo Komárno (SK), en la ejoj de Libera Eŭropia Universitato Kelemantia de AIS (LEUKAIS), strato Župna/Megye 1, urbocentre ĉe Klapka-placo.

La tempoj indikitaj en tiu ĉi eldono estas ankoraŭ provizoraj kaj povas ŝanĝiĝi. Bonvolu atenti informojn afiŝitajn de la SUS-sekretariejo.

1 Oficialaĵoj

dato	hor	evento	salono
08-27 di	10:00–11:00	senatkunsido (nepublika)	Descartes
	11:00–12:00	ekzamenofico (nepublika)	Descartes
	12:00–13:00	ekzamenofico (konsult-horo)	Descartes
	16:00–17:00	assembleo de la Subtena Sektoro	Descartes
	17:00–18:00	inaŭguro de SUS 29	Boulanger
08-28 lu	20:00–20:30	sekcikunsidoj 1–6	sekcisalonoj
08-30 me	20:00–21:30	forumo pri akad. rekomendoj	Boulanger
09-02 sa	16:00–17:00	ĝenerala assembleo de SciS	Boulanger
	17:00–18:00	fermo de SUS 29	Boulanger

Post SUS 29 (lunde/marde, la 4-an/5-an de septembro, okazos klerig-kibernetika simpozio de TAKIS omaĝe al OProf. Miloš Lánský, kiu forpasis je 2005-05-13. La SUS-kotizo *ne* inkluzivas la partoprenon en tiu simpozio.

2 Kursoj kaj prelegoj

2.1 Sciencaj kursoj

La sekvaj kursoj – valoraj po unu stud-unuon (stu) – okazos ekde lundo ĝis ĵaŭdo (08-28/08-31), ĉiutage je la sama tempo, en blokoj nomataj A/B/C/D¹. La du-horaj blokoj inkluzivas paŭzo(j)n de 30 minutoj, pri kiuj individue decidas la kursestroj. La longaj paŭzoj tagmeza kaj vesperaj nomiĝas M kaj V:

	A	B	M	C	D	V
kurso	8:30–10:30	10:30–12:30	12:30–14:00	14:00–16:00	16:00–18:00	18:00–19:30

Sekcio 1: Kibernetiko

K1 OProf. Dr. habil. Helmar Frank (Paderborn, DE), ADoc. Mag. Natalja Maksimova (Roslavl, RU)

Instruado (bloko A)

K2 OProf. Dr. habil. Eva Poláková (Komárno, SK), ADoc. Dr. Ljubiša Preradović (Banja Luka, BA)

Kreado de datenbanko (laŭ praktika ekzemplo) (bloko B)

K3 OProf. Dr. Reinhard Fössmeier (Munkeno, DE)

Enkonduko al maŝina tradukado (bloko A)

Maŝina tradukado havas viglan historion, en kiu ĝi uzis diversajn alirojn kaj havis diversajn bildojn pri la analogeco al homa tradukado. La kurso prezentas la evoluon kaj la bazajn teknikojn.

¹Por eviti miskomprenojn ni ne uzas la literon Ĉ por marki blokon.

Sekcio 2: Humanistiko

H1 ADoc. Mag. Cristina Tanc (Sibiu, RO), OProf. Dr. Reinhard Fössmeier

La Sibiu Programo de Eŭrolingvistiko (bloko B)

Kunlabore kun sekcio 1. La celo de la Sibiu-a Programo estas, evoluigi la lingvon ene de la limoj, kiujn starigas la baza regularo kaj la logiko, kaj per tio kontribui ankaŭ al la lernigado de aliaj eŭropiaj lingvoj, uzante ILon kiel referenclingvon.

Sekcio 3: Struktursciencoj

Sekcio 4: Filozofio

F1 PDoc. Dr. Josef Vojáček (Brno, CZ)

Logiko (bloko A; unua leciono lunde, bloko D \triangle)

kunlabore kun sekcio 1

F2 ADoc. Dr. Macko (Munkeno, DE), OProf. Dr. Angstl (Munkeno, DE)

La Hegel-a fenomenologio de la spirito (bloko C)

La „Fenomenologio de la spirito“ estas verŝajne la plej grava verko de Hegel, abunde komentita kaj disputata. Eblas konsideri ĝin la unua granda sistemo de Hegel, en kiu li volas montri la dialektikan disvolvigon de la konscio al la memkonscio en la tempo, kio devus esti la memmontriĝo de la spirito. Tial tiu verko estas samtempe historia kaj psikologia, ĝi traktas la dialektikan disvolvigon de la homa scio ĝenerale, metante sin tempe en diversaj sciencaj fakoj.

Sekcio 5: Natursciencoj

N1 OProf. Hans Dietrich Quednau (Haag, DE)

Modeligo de la populacia dinamiko ĉe bestoj kaj plantoj (bloko C)

N2 AProf. Krystina v. Niewiadomski-Kauffmann (Caputh, DE)

Praktika agado de doloro – ekzercado, ekzemplo kun muziko (blokoj A, B; merkrede, ĵaŭde \triangle)

Sekcio 6: Morfosciencoj

M1 EProf. ADoc. Mag. Boĵidar Leonov (Karlovo, BG)

Eko-turismo (bloko B; lasta leciono: merkrede, bloko D \triangle)

M2 EProf. ADoc. Mag. Alicja Lewanderska (Haag, DE)

Bezonoj kaj postuloj pri ergonomiko kaj publikaj rilatoj (bloko C)

Baza faktoro kaŭzanta penigon de laborprocezo estas la pozicio de homa korpo kaj lia fizika kaj psika stato. Decido pri elektita ergonomia nivelo devas esti farata paralele al ĉiuj aliaj teknikaj premisoj. Oni alprenis ke en kazo de laboro stara, ira estas tri ĉefaj grupoj de peneco. Krome en prilaboro estis specifitaj kvar zonoj de penigeco depende de alteco, sur kiu okazas laboro. Tamen tio ne devas esti reĝimo kaj aŭtomata procezo, ĉar se koeficiento de penigeco estas pli alte premisita, oni devas ŝanĝi ĝin akomodante altecon de unuopaj manipulitoj al donitaĵoj antropometriaj de personaro.

2.2 Liberaj prelegoj (konferencprogramo de SUS 29)

Liberaj kaj projekt-akceptigaj prelegoj okazas en la sekciaj salonoj, plejparte dum bloko D.

K-p1 EProf. Mag. Sara Konnerth

Organizado kaj utiligo de virtuala kurso (lunde)

K-p2 ADoc. Mag. Natalja Maksimova, projektakceptiga prelego

Per-interreta okazigo de komunikadkibernetikaj universitataj kursoj (lu.)

H-p1 Nzaniye Jesse Le-Prince dr.

Per-reva informado (merkrede)

F-p1 Dr. Eugen Macko

Esperanto, la lingvo de la pensado (marde)

N-p1 OProf. Hans Michael Maitzen

Danĝero el la Lakta Vojo (marde)

F-p2 ASci. Szabadi Tibor: **La filozofio de Oomoto** (merkrede, 13h00 )

M-p1 EProf. Mag. Alicja Lewanderska-Quednau

Nuntempaj rolo kaj tasko de la socikibernetiko (merkrede)

2.3 Lingvokursoj kaj kromkursoj

Li1 ADoc. Eva Bojaĝieva (Plovdiv, BG): ILo por komencantoj. sabate la 26-an, A-D

Li2 ASci. Augusto Casquero (Valencia, ES): ILo por progresantoj. tempo anoncota

Li3 OProf. Dr. habil Eva Poláková: Enkonduko al la Slovaka lingvo. tempo anoncota

Kr-N-1 ADoc. Eva Bojaĝieva (Plovdiv, BG): Biokemio. bloko C, salono Komenský

3 Kandidataj finekzamenoj

La finekzamenoj por kandidatoj, kiuj celas originale aŭ per adapta adopto akiri ĉe AIS la agnoskon de akademia nivelo (bakalaŭreco, magistrecio, doktoreco aŭ habilit-doktoreco), okazas je vendredo (09-01) kaj eble sabato (09-02), laŭ surloke afiŝota horaro. La kandidatprelegoj estas publikaj, kaj ĉiuj SUS-anoj estas bonvenaj ĉeesti la prelegojn de la kandidatoj kaj la postajn diskutojn. Parolaj fakekzamenoj (nepublikaj) kaj skribaj ekzamenoj (se necesaj) okazos laŭ horaro afiŝota de la Ekzamenofico.

Kandidatoj, pri kies dokumentoj estas iuj duboj, bonvolu veni al la konsult-horo de la ekzamen-ofico komence de SUS (vd. sekcio 1).

La ekzamen- kaj studregularoj de AIS ŝanĝiĝis je 2004-06-14, la rabato por reform-eŭropaj landoj ŝanĝiĝis en 2005; sed ĉiu, kiu studentigis antaŭ tiuj datoj, rajtas ene de la valideco de sia legitimilo diplomigi laŭ la malnovaj regularoj. Ĉiu kandidato antaŭ sia finekzameniĝo nepre devas esti enskribiĝinta al minimume du (2) [malnovaj regularoj: tri (3)] sciencaj SUS-kursoj (se li ne jam havas la bezonatajn kurs-atestojn). Inter la du [tri] kursoj minimume unu devas esti en la sekcio, en kiu okazas la kandidatiĝo, minimume unu devas esti el alia sekcio. Laŭ la malnovaj regularoj maksimume unu el tiuj kursoj povas esti lingvokurso. Entute estas bezonataj kvar (4) atestitaj kursaj studunuoj; nur por adapta adopto sufiĉas, laŭ la novaj regularoj, la du SUS-kursoj.

Laŭ la novaj regularoj necesas sukcesa ekzameno pri ĉiuj kursoj; laŭ la malnovaj, en almenaŭ unu kurso (kaj en almenaŭ du, se ĉiuj studunuoj bezonataj por la fina ekzameno estas akiritaj dum la SUS) la kandidato devas sukcesi en la kursfina ekzameneto per minimume la noto 6/10 (7/10 sen ĉeesto en kurso).

La Ekzamenofico atentigas kandidatojn, ke prezentiĝo al la fina ekzameno sen antaŭa regularkonforma kompletigo kaj disponigo de ĉiuj necesaj dokumentoj al la Ekzamenofico povas kaŭzi aŭ **malakcepton** de la kandidatiĝo aŭ **postulon de krompago** superanta la normalan ekzamenkotizon pro la kroma laboro.

**Por eviti problemojn
bv. rekontroli,
ĉu ĉiuj viaj
ekzamen-dokumentoj
jam troviĝas ĉe la
Ekzamenofico!**

La Ekzamenoficon por la jaroj 2004–2007 konsistigas	
Direktoro:	OProf. Quednau
Vicdirektoro:	OProf. Polakova
sekcio 1 (kibernetiko):	OProf. Fössmeier
sekcio 2 (humanistiko):	OProf. Korĵenevskaĵa-Gouriou
sekcio 3 (struktursciencoj):	OProf. Minnaja
sekcio 4 (filozofio):	OProf. Angstl
sekcio 5 (natursciencoj):	OProf. Maitzen
sekcio 6 (morfosciencoj):	OProf. Lobin

4 Kadra Programo

Tradicie, AIS invitas ĉiujn SUS-anojn al la partopreno en la **Akademia Forumo** (2006-08-30) kun publika diskuto.

Okazos kunsido de la **Subtena Sektoro** (2006-08-27) kaj **ĝenerala asembleo (ĜA) de la Scienca Sektoro** (2006-09-02). Tie voĉdoni rajtas la subtenaj membroj resp. la efektivaj membroj. En la ĜA krome ĉiuj adjunktoj havas la rajton ĉeesti; asociitaj docentoj (ADoc) havas krome la parolrajton.

5 Organizaj detaloj

Ĉiu interesulo rajtas aliĝi al SUS. Ne necesas formalaj sciencaj kvalifikoj.

5.1 Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj

Ĉiu SUS-ano rajtas senpage enskribiĝi kaj partopreni kursojn (tion inkluzivas la aliĝkoto). Kontraŭ aparta koto (po 0,3 AKU por unu kurso) oni ricevas oficialan partopren-ateston, ĉeestinte minimume 3/4jn, kaj noton, se oni sukcesis en la kursfina ekzameneto. La ekzameno oni rajtas partopreni sen ĉeesti la kurson dum la sama SUS, do iamaj kursanoj povas ripeti la ekzameneton.

Ankaŭ pri kursoj ofertataj en la *instruteko* (vidu ĉapitron 6) povas okazi ekzamenetoj por studentoj, kiuj aŭtodidakte preparis sin.

Se studento ekzameniĝas sen 3/4-a partopreno en kurso, li devas sukcesi minimume per la noto 7/10 por ricevi ateston.

La kursfinaj ekzamenetoj de la sciencaj kursoj okazos ĵaŭde (08-31) vespere, se nenio alia estas anoncita dum la kursoj. La SUS-anoj, kiuj intencas akiri kurs-atestojn, enskribiĝu al la kursoj ĉe la SUS-oficejo dum la akcepto-/registriĝo-tagoj (08-26/27) aŭ anoncu sian intencon dum la unua leciono. La preferataj tempoj por la ekzamenetoj estas: Bloko A 16.00 – 16.40, bloko B 16.40 – 17.20, bloko C 17.20 – 18.00. Kursestroj tamen povas fiksi aliajn tempojn, ekzemple se iuj studentoj bezonas tempon por ekzameno pri kurso el la instruteko (vidu ĉapitron 6).

Bonvolu atenti, ke je 2004-06-14 ŝanĝiĝis la regularoj de AIS. Kiu studentigis post tiu dato, povas akiri studunuojn nur per kursfina ekzameneto; puraj partopren-atestoj ne plu validas.

5.2 Prelegoj

La preleg-kunsidojn gvidas la dekanoj aŭ vicdekanoj de la koncerna sekcio, aŭ komisiitoj de ili. La partopreno en prelegoj (kontraŭe al partopreno en kunordigita preleg-serio) ne egalvaloras al kurspartopreno kaj ne rezultas stud-unuojn.

Debutprelegojn prezentas nove alvokitaj profesoroj, *docentiĝprelegojn* estontaj plenrajtaj docentoj de AIS. La prelegoj daŭras po 45–60 minutojn, inkluzive de diskuto kaj paŭzeto. La preleglingvo estas ILo.

La sama tempo estas je dispono por *invititaj prelegoj* (en iu ajn oficiala lingvo de AIS) kaj por *projekt-akceptigaj prelegoj* (en ILo) de kandidatoj, kiuj celas estontan originalan akiron (ne adopton) de grado de AIS.

Ankaŭ liberaj ISKanoj (t. e. ISKanoj, kiuj ankoraŭ ne kiel adjunktoj aŭ efektivaj membroj apartenas al AIS) rajtas prezenti t. n. *liberajn prelegojn*, pere de la dekanato de la koncerna sekcio. Ili rajtas okazi en iu ajn oficiala lingvo de AIS kaj daŭri po 25–40 minutojn.

Ankaŭ *konciz-prelegoj* (10–20 minutoj) povas okazi en ajna oficiala lingvo de AIS. Ili estas oferteblaj ankoraŭ post la starigo de la SUS-programo, tra la koncerna (vic)dekanato

aŭ (vic)fakarestro. Temoj de konciz-prelegoj ne listigitaj en la programkajero estos afiŝataj dum SUS laŭ la informoj transdonitaj de la prelegontoj al la SUS-oficejo. Laŭeble la prelegantoj mem pretigu du A4-foliojn afiŝeblajn.

5.3 Aliĝo

Aliĝilojn bonvolu sendi al la senata sekretario (Dr. Reinhard Fössmeier, Rahel-Straus-Weg 19, DE-81673 München, Germanio; retpoŝto [info\(heliko\)ais-sanmarino.org](mailto:info(heliko)ais-sanmarino.org)). Informoj pri SUS 29 troviĝas rete ĉe

www.ais-sanmarino.org/arangxoj/sus/sus29.

Bonvolu atenti, ke aliĝoj ne estas trakteblaj sen pago de la aliĝkotizo. La kotizo ne inkluzivas ekzamenkostojn, kurskotizojn (por ricevo de atesto), kostojn por loĝado kaj manĝado. Aliĝo ne estas transdonebla.

SUS ne asekuras siajn partoprenantojn kontraŭ malsano, akcidentoj aŭ io alia. Bonvolu atenti, ke multaj malsan-asekuroj ne asekuras malsanon en eksterlando. Konsilindas speciala asekuro por eksterlandaj vojaĝoj.

Pagi aliĝkotizon devas ankaŭ *kursgvidontoj* kaj *prelegontoj*. Kurs- kaj prelegproponoj kaj aliĝoj por ekzameno estas trakteblaj nur post alveno de la SUS-aliĝkotizo.

Ĝis unu monaton antaŭ la komenco de la sesio (t. e. ĝis 2006-07-27) la aliĝkotizo estas nur 0,3 AKU, poste 0,5 AKU. Kotizo por unutaga partopreno en SUS estas po 0,2 AKU. Partoprenantoj el reform-eŭropaj landoj rajtas je rabato de **75 %**. La kotizo estas pagebla laŭ jenaj vojoj (ĉiam kun indiko de la pagocelo kaj de la nomo de la aliĝanto):

- al la Germana konto 2051-305 de AIS ĉe Postbank Hannover, banko-kodo 25010030, Swift-kodo PBNKDEFF250; IBAN DE19 2501 0030 0002 0513 05, BIC: PBNKDEFF.
- al la UEA-konto de AIS: aisc-j. (Eblas kreditkarte pagi al sia UEA-konto.)
- Pro la altaj bankokostoj ni petas ne sendi ĉekojn.

ISKanoj, kies servobonhavo havas krediton de almenaŭ 0,5 AKU, povas simple deprenigi la kotizon de ĝi. Dumvivaj subtenaj membroj kaj studentoj kun valida legitimilo ne pagas SUS-kotizon, se ili aliĝas minimume unu monaton antaŭ la sesio; poste ili pagas 0,2 AKU.

5.4 Mono

Kadre de AIS kostoj kaj prezoj estas indikataj en „Akademiaj Kotiz-Unuoj“ (AKU). 1 AKU nun valoras € 65,00. Dum SUS 29 AIS akceptas pagojn en eŭroj aŭ en la loka valuto, la Slovaka krono (SKK).

La valuto sude de Danubo en Komárom estas la Hungara forinto (HUF). Bonvolu atenti, ke la moneroj de 10 SKK kaj 20 HUF havas la samajn koloron kaj diametron, sed la unua valoras proksimume la 3,5-oblon de la dua. Kontrolu ricevatan ŝanĝmonon!

Sen garantio ni informas, ke en junio 2006 unu eŭro valoris ĉirkaŭ 38 slovakajn kronojn aŭ 263 hungarajn forintojn. En iuj grandaj vendejoj eblas pagi per eŭro-biletoj kaj rericivi reston en la loka valuto.

5.5 Salonoj

La salonoj estas nomitaj honore al jenaj eminentuloj:

ARISTOTELO de Stagira, Helene *Αριστοτέλης* (384–322 a. K.)

Helena filozofo, fondinto de la empiria naturscienco en la kadro de ampleksa empiria sistemo kondukanta de la logiko ĝis la ŝtatteorio. Liaj instruoj ĝis la fino de la mezepoko restis la fundamento de sciencaj instruado kaj esplorado. Li estis disĉiplo de Platono kaj instruisto de Aleksandro la Granda.

Georges BOULANGER (1909–1982)

Fondinto (en 1957) de *Association Internationale de Cybernétique* (Namur, BE) kaj ties prezidanto ĝis sia morto; en 1980 enkondukis en tiun asocion ILOn kiel trian laborlingvon, eklerninte ĝin kiel 70-jarulo. Vicprezidanto de Eŭropa Klubo kaj membro de ties iniciat-grupo AIS.

René DESCARTES, Latine: Renatus Cartesius, ILe: Kartezio (1596–1650)

„La patro de la moderna filozofio“, kiel oni ofte nomas lin, provis ligi filozofion al la natursciencoj aplikante al ambaŭ racian metodon. Sian mekanikan mondkoncepton li aplikis eĉ en psikologio. Li skizis ankaŭ principojn de planlingvo en sia letero de la 20-a de novembro 1629 al la benediktana scienculo *Mersenne*.

EŬKLIDO de Aleksandrio (*Ευκλείδης*) (ĉ. 365–ĉ. 300 a. K.)

Helena matematikisto kaj natursploristo, kiu laboris sub Ptolemeo (Ptolemaios) la 1-a ĉe la „Museion“ en Aleksandrio. Lia plej fama verko estas la libro „Elementoj“, aksioma prezento de la tutaj tiamaj geometrio kaj aritmetiko. Krome li verkis manlibron „Geometria optiko“ kaj aliajn traktaĵojn pri planimetrio, sfero kaj matematika muzikteorio.

Galileo GALILEI, ILe: Galilejo (1564–1642)

Kvankam liaj ideoj troviĝas kadre de la kristana mondkoncepto, la Itallingva natursciencisto konfliktis kun la katolika eklezio pro sia verko pri la galaksi-modeloj, en kiu li argumentas por nova, kies centro estas la suno. Kiel unu el la unuaj sciencistoj li verkis ne plu en la Latina lingvo, nekomprenata de vasta publiko.

Mohandas Karamchand GANDHI / *मोहनदास करमचन्द गांधी* (1869–1948)

Hinda politikisto, kiu proklamis senbatalilan ribelon kontraŭ la okupadaj trupoj, per manŝpinado kontraŭ la teksaj fabrikoj de Britio, per „salmarŝo“ kontraŭ la brita salmonopolo, per reiro al simpla natura vivoformo, por formi sendependan komunan ŝtaton de hinduoj kaj islamanoj. Li subtenis la ideon de la Internacia Lingvo, kunlaborante kun la svisa sciencisto *Edmond Privat*.

Jan Amos KOMENSKÝ, Latine: Johannes Amos Comenius. ILe: Komenio (1592–1670)

La fondinto de la moderna pedagogio ne nur teorie, sen ankaŭ praktike kontribuis al sia fako, i.a. per facila lingvoinstrua legolibro. Li proponis la enkondukon de planlingvo kaj la starigon de internacia akademio de la sciencoj.

Giuseppe PEANO (1852–1932)

La Itala matematikisto interalie starigis sistemon por aksioma difino de la naturaj nombroj. En 1903 li prezentis planlingvan projekton de simpligita Latino, nomatan „*Latino sine flexione*“; en tiu lingvo li eldonis sian verkon *Formulario Mathematico*. Ek de 1909 li estis prezidanto de la planlingva akademio *Academia pro Interlingua*.


Hermann SCHMIDT (1894–1968)

Jam en la jaro 1941 la Germana fizikisto kaj regulad-teknikisto prezentis la bazajn principojn de kibernetiko. Ek de ĉ. 1962 li pli kaj pli influis la filozofion de klerig-kibernetiko kaj de aliaj antropokibernetikaj branĉoj.

6 Instruteko

Dum SUS 29 eblas akiri studunojn ankaŭ surbaze de memstara studado de kursoj el la instruteko de AIS, se la kandidato sukcesas en kursfina ekzameno per noto de minimume 7/10. La ekzameno povas okazi dum SUS 29, se la kandidato sciigas sian deziron kun indiko de la elektita(j) kurso(j) plej malfrue **ses semajnojn** antaŭ la malfermo de SUS 29 al la ekzamen- kaj klerigofico (OProf. H. D. Quednau, Forstwissenschaftliche Fakultät, Am Hochanger 13, DE-85354 Freising).

Superrigardo pri la Interretaj kursoj de AIS troviĝas ĉe www.ais-sanmarino.org/kursoj/. Sed ne ĉiuj tiuj kursoj estas disponeblaj por ekzameno dum SUS 29. Ĉe intereso bonvolu informiĝi ĉe la klerigofico.



7 Situo de Komárno kaj la Akademi-domaro

Komárno situas ĉe la enfluejo de la rivero Vago (*Váh, Vág*) en la riveron Danubo, kiu tie markas la landlimon inter Slovakio kaj Hungario. La urbo estas dulingva (sk+hu) kaj havas ĉirkaŭ 37.000 loĝantojn. Aliborde (sude) situas la Hungara urbo Komárom. La alto estas ĉirkaŭ 110 m super marnivelo.

La du urboj informas pri si Interrete, www.komarno.sk en tri lingvoj, www.komarom.hu en du. La poŝtkodo de Komárno estas SK-94501, tiu de Komárom HU-2900.

Hungare la tuta duparta urbo nomiĝas Komárom. Por distingi hungaroj nomas la slovakian parton *Rév-Komárom* (havena aŭ roda K.) aŭ *Észak-Komárom* (Nord-K.), la hungaran parton *Dél-Komárom* (Sud-K.).

Strat-ŝildoj montras supre slovakajn kaj malsupre hungarajn stratnomojn.

SUS-ejo. La SUS-programo okazas en la Akademi-domaro ĉe la Eŭropa Korto, strato Župná/Megye 1. La proksimuman situon de la salonoj en la AIS-ejoj montras la plano fine de la programkajero.

Loĝado. En Komárno kaj en Komárom troviĝas pluraj hoteloj de diversaj kategorioj. Iuj ofertas informojn kaj mendon en la Interreto.


La hoteloj en Komárom (HU) plejparte troviĝas proksime al la banejo. La distanco al la centro de Komárno (SK) estas ĉ. 3 km.

En Komárno disponeblas favorprezaj ĉambroj en la studenta loĝejo ČAJKA (ĉ. 3 km de la urbocentro). La loĝejo situas ĉe Bratislavská cesta 2 (Pozsonyi út; kp. la mapeton). Interesuloj bonvolu rapide turniĝi al OProf. Eva Poláková (retpoŝto: eva.polakova@scc.sk) kaj definitive mendi sian liton. La prezoj dependas de la nombro de loĝantoj; provizoraj prezoj (2006-06-23) estas 9 eŭroj por lito en dulita ĉambro kaj 16 eŭroj por unulita ĉambro.

Alvojaĝo. Venante sur la Hungara aŭtovojo M1 (E60/E75) uzu la elirejon „Komárom/Kisber“, iru norden (Hungara nacia vojo 13) al Komárom kaj transiru Danubon. Venante de nordo uzu la Slovakian naciajn vojon 64 de Nitra kaj Nové Zámky.

Fervoje estas pluraj ebloj atingi Komárnon. Ni konsilas informiĝi en stacidomo aŭ Interrete. Ĉar malmultas trajnoj inter Komárno kaj Komárom, konsideru eltrajniĝi en Komárom, de kie Komárno estas facile atingebla; taksio al la centro de Komárno kostas ĉ. 200 SKK (sen garantio).

Telefonado. La internacia antaŭnumero de Slovakio estas **421**, tiu de Hungario **36**. Por konekto eksterlanden en ambaŭ landoj ciferumu **00**.



Enhavo

1	Oficialaĵoj	2
2	Kursoj kaj prelegoj	2
2.1	Sciencaj kursoj	2
2.2	Liberaj prelegoj (konferencprogramo de SUS 29)	3
2.3	Lingvokursoj kaj kromkursoj	4
3	Kandidataj finekzamenoj	4
4	Kadra Programo	5
5	Organizaj detaloj	5
5.1	Kursoj kaj kursfinaj ekzamenetoj	5
5.2	Prelegoj	5
5.3	Aliĝo	6
5.4	Mono	6
5.5	Salonoj	6
6	Instruteko	7
7	Situo de Komárno kaj la Akademi-domaro	8
	Programtabelo	11



Skiza stratplano de Komárno (SK). Duobla cirklo markas la SUS-ejon.
Informoj sen garantio. AIS San-Marino.

Kelkaj utilaj esprimoj

	Slovake	Hungare
bonan matenon!	dobré ráno!	Jó reggelt!
bonan tagon!	dobry deň!	Jó napot!
bonan vesperon!	dobry večer!	Jó estét!
pardonu!	pardón!	bocsánat!
dankon!	ďakujem!	köszönöm!
ne dankinde.	za málo.	szívesen.
la fakturon, mi petas.	zaplatím, prosím.	fizetek, kérem.
necesejo	záchod	vécé
kie estas...	kde je...	hol van...
Prononco	ch → ĥ ž → j̇ č → ĉ korno (´) longigas vokalon	s → ŝ sz → s cs → ċ korno (´) fermas vokalon

Tabela programo

	sal.	A 8:30–10:30	B 10:30–12:30	C 14:00–16:00	D 16:00 17:00		V vespere
sab	Ko	ILo 1 (Li1)					
dim 08-27	Dc		ekzamenofico 11:00 nepublika 12:00 konsultado		SubS	inaŭguro (Boulangier)	
lun 08-28	Sm Ko Dc Gl Ar	K1 Frank K3 Fössmeier	K2 Poláková H1 Tanc M1 Leonov	Kr-N-1 Bojaĝieva F2 Macko/Angstl N1 Quednau M2 Lewanderska	K-p1 F1 Vojáček	K-p2	seki- kunsidoj
mar 08-29	Sm Ko Dc Gl Ar	K1 Frank K3 Fössmeier F1 Vojáček	K2 Poláková H1 Tanc M1 Leonov	Kr-N-1 Bojaĝieva F2 Macko/Angstl N1 Quednau M2 Lewanderska	F-p1	N-p1	
mer 08-30	Sm Ko Dc Gl Ar	K1 Frank K3 Fössmeier F1 Vojáček N2 Niew.-K.	K2 Poláková H1 Tanc N2 Niew.-K. M1 Leonov	Kr-N-1 Bojaĝieva F2 Macko/Angstl N1 Quednau M2 Lewanderska	M-p1 M1 Leonov	H-p1	Akad. Forumo (Boul.)
ĵaŭ 08-31	Sm Ko Dc Gl Ar	K1 Frank K3 Fössmeier F1 Vojáček N2 Niew.-K.	K2 Poláková H1 Tanc N2 Niew.-K.	Kr-N-1 Bojaĝieva F2 Macko/Angstl N1 Quednau M2 Lewanderska	kursfinaj ekzame- netoj		
ven 01	Ko	Publikaj finekzamenoj			Publikaj finekzamenoj		
sab 09-02	Ko Bo	Publikaj finekzamenoj			ĝen. asem.	solena fermo	
dim 03		foriro / Lánský-simpozio					

Prelego F-p2 okazas merkrede, 13:00, en salono Descartes.

Salonoj

Mallongigoj de la salonoj			
Bo	Boulangier	inaŭguro, forumo, fermo	
Sm	Schmidt	Sekcio 1 (kibernetiko)	
Ko	Komenský	Sekcio 2 (homsciencoj)	
Pe	Peano-Eŭklido	Sekcio 3 (struktursciencoj)	
Dc	Descartes	Sekcio 4 (filozofio)	
Gl	Galileo	Sekcio 5 (natursciencoj)	
Ar	Aristotelo-Gandhi	Sekcio 6 (morfosciencoj)	
			Komparu la klarigojn en ĉapitro 5.5

Kalendareto								
	lu	ma	me	ĵa	ve	sa	di	
aŭg	21	22	23	24	25	26	27	aŭg
	28	29	30	31	1	2	3	
sep	4	5	6	7	8	9	10	sep

